

# Usona Esperantisto № 2019:5 (sep-okt)

## PDF-versio

Usona Esperantisto № 2019:5 en formo de presebla PDF-dosiero.

## Anoncoj

Kandidatiĝu!; *Information for Interlinguists*; korespondpeto el Suda Karolino; Filma konkurso vojaĝigos vin al Montrealo; Aliĝu al UK-2020!; UEA invitas prelegi en IKU; Vintra Esperanta Klerigado; konkurso por radioamatoroj; forpasis Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof; Nova opero en Esperanto.

## Ni kunkongresos en Montrealo kun UEA!

**de la prezidanto** • Filipo DORCAS  
Malgraŭ nia kutimo kongresi ĉiun jaron en Usono, en 2020 ni kunkongresos en Montrealo, Kanado.

## De la estraro

Raportoj de la Direktoroj kaj aliaj estraranoj.

## Finfine komplete! (pli-malpli)

**de la redaktoro** • Hoss FIROOZANIA  
Post jardeko da laboro, nia retarĥivo enhavas preskaŭ ĉiujn numerojn de ĉiuj bultenoj iam eldonitaj de landaj Esperanto-organizoj en Usono.

## Regionaj raportoj

Lastatempa agado en Teksaso kaj Brita Kolumbio

## Renkontiĝo ĉe la Balta Maro

**vojaĝe tra la mondo** • Orlando E. RAOLA  
Jam delonge mi estis aŭdinta pri la Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET). Ĉi-jare mi decidis ne plu prokrasti konatiĝon kun tiu elstara ero de la Esperanta kulturo.

## Sukcesa jubilea NASK

**loke** • Amanda Higley SCHMIDT  
Ĉi-jare, kiel kutime, la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto estis bonega. Tamen, eĉ pli bona ol antaŭe. Dum la pasintaj 50 jaroj de NASK, ni neniam havis tiom da homoj.

## Traduku!

**traduku!** • Hoss FIROOZANIA, Lee MILLER, Tim WESTOVER  
Kiel vi elangligus la jenan oreilvermon?

## La vivo de Peĉjo


**ŝercoj** • Timothy BORONCZYK  
La kvina en serio de bildstrioj danke al Timoteo BORONCZYK.

## La murdita skiisto

**enigmo-solvoj**  
La solvo de nia pasintnumera enigmo.

## Pri proponoj ŝanĝi nian lingvon

**el la arĥivo**  
Ĉiu gazeto de Esperanto devas, por averti novajn esperantistojn, montri per grandaj literoj la avizon: "Ne malŝparu tempon por skribi pri dezireblaj ŝanĝoj je la lingvo Esperanto!"



Ĉi-numere, por festi la kompletigon de nia retarkivo, ni ŝtelas la belegan kovrilarton de la kvara numero de la *American Esperanto Journal*, kiu aperis en Aprilo, 1907. Ĝi kaj preskaŭ mil aliaj numeroj estas nun haveblaj por reta legado!

# Anoncoj

## Kion vi deziras por Esperanto-USA?

Jordon estas membro de la Kandidatiga Komitato por 2020. Oni povas kontakti lin ĉe [jordon@kalilich.com](mailto:jordon@kalilich.com).

Ĉu vi deziras disvastigi Esperanton aŭ pliriĉigi la Esperanto-kulturon? Kion vi farus se vi havus pli da rimedoj? Ĉu vi havas apartajn talentojn, kiujn vi povus disponigi al la movado?



Esperanto-USA serĉas kandidatojn por sia venontjara estrara balotado. En 2020 estos elektitaj kvar el la dek estraranoj: Prezidanto, Vicprezidanto kaj du Direktoroj. La gajnontoj deĵoros ĝis 2023.

La estraro havas decidpovon pri la funkciado de Esperanto-USA. Ĝi konsideras proponitajn projektojn, decid(ig)as kiel spezi monon, kaj kontrolas la plenumadon de taskoj. Ofte estraranoj ankaŭ membras en komitatoj aŭ alprenas al si unuope fendaĵojn.

La prezidanto kaj vicprezidanto krome havas specialajn rolojn. Kiel la vizaĝo de Esperanto-USA, la Prezidanto verkas rubrikon por *Usona Esperantisto*, direktas kunsidojn de la estraro, kaj malfermas kaj fermas la Landan Kongreson. La Vicprezidanto helpas kaj anstataŭas la Prezidanton laŭbezone.

La estraro komunikas kun si interrete dum la tuta jaro kaj kunsidas interrete ĉiun monaton. Estraranoj prefere povu ĉeesti tiujn kunsidojn kaj la surlokajn ĉe la Landa Kongreso, kiu okazas en malsama urbo ĉiujare.

Kandidatoj por la prezidanteco kaj la vicprezidanteco devas esti minimume 30-jaraĝaj la 8-an de Aŭgusto, 2020. Direktoraj kandidatoj devas esti minimume 18-jaraĝaj la 8-an de Aŭgusto, 2020.

Do, kion vi farus se vi estus estrarano? Kian planon vi havus por Esperanto-USA en la sekvontaj tri jaroj? Se la ideo kandidatiĝi interesas vin, bonvolu kontakti

min.

— Jordon KALILICH

## Information for Interlinguists

Among the many publications and initiatives of the Esperantic Studies Foundation is the periodic journal *Informilo por Interlingvistoj*, now available in English translation as *Information for Interlinguists*. Both are published in cooperation with the Center for Research and Documentation on World Language Problems.



*Ifi/IpI* covers news from the fields of planned languages, interlinguistics, and language planning: events, new publications, conference reports, and more. The journal is available for free online in both **Esperanto** <<https://www.esperantic.org/eo/publikajoj/ipi/>> and **English** <<https://www.esperantic.org/en/publications/ifi-information-for-interlinguists/>>.

## Korespondi deziras

Mi deziras korespondi por plibonigi mian kapablon en Esperanto. Interesas min muziko, sciencfikcio kaj fantazio, kaj judismo.

**James M Prevatt**

**#358643, Evans CI F4-A**

**197, 610 Highway 9W, Bennettsville SC 29512**



## Filma konkurso vojaĝigos vin al Montrealo

Kadre de la 55-jariĝo de la esperanta disaŭdigo de Ĉina Radio Internacia (ĈRI) kaj de la agado por Ĝemelaj Urboj de UEA, ĈRI kun UEA lanĉas la filman konkurson *Mia Asocio, Mia Urbo*. La konkurso celas diskonigi Esperanto-asociojn en diversaj lokoj de la mondo samkiel la lokajn

kulturaĵojn de la urboj, kie situas la E-asocioj.

Por partopreni kandidatoj devas provizi mallongan filmon kaj artikolon prezentantajn la E-asociacion kaj kelkajn kulturaĵojn de sia

urbo **ĝis la 30-a de Novembro**. La filmoj kaj la artikoloj devas esti en Esperanto, kaj la plej bonaj ricevos premiojn, kiuj povas inkluzivi repagon de vojaĝo al Montrealo, Kanado, por la 105-a Universala Kongreso, kie la premiotaj filmoj estos prezentitaj.

Por pli da informo, vidu **artikolon en la revuo Esperanto** <[https://revuoesperanto.org/filma\\_konkurso](https://revuoesperanto.org/filma_konkurso)>.

## Aliĝu rete al UK-2020 en Montrealo

En 2020 la 105-a Universala Kongreso venos al Montrealo, Kebekio, de la 1-a ĝis la 8-a de Aŭgusto. Estas ege malofte, ke UK okazas en Nordameriko, kaj neniam antaŭe ĝi okazis en orienta Kanado. Nepre ne maltrafu tiun ĉi oportunun partopreni en la plej granda internacia Esperanto-evento de la jaro.

La baza prezo por usonanoj estas 190 eŭroj (proks. 210 usonaj dolaroj) por individuaj membroj de UEA, sed **nur se vi aliĝos antaŭ la fino de Decembro**. Poste la prezo altiĝos. Eblas **aliĝi rete ĉe la retejo de UEA** <<https://uea.org/kongresoj/alighilo>>.

## UEA invitas prelegi en IKU

Ĉi-jare ĉe la UK en Montrealo okazos la 73-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato (IKU). UEA invitas profesorojn, docentojn kaj personojn kun similaj kvalifikoj sendi proponojn pri prelegoj al Amri WANDEL, la sekretario de IKU [amri@huji.ac.il](mailto:amri@huji.ac.il). Proponoj alvenu plej laste la **15-an de Januaro 2020**.

Lige kun la IKU okazos studsesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS). Kandidatoj por IKU-



prelego povas samtempe proponi AIS-kurson, kiu konsistos el unu prelego kadre de la IKU kaj el du kromaj prelegoj. Tiukaze bonvolu indiki, ĉu la IKU-propono estu konsiderata ankaŭ kiel AIS-kurso.

La prelegoj estu pri interesaj, allogaj temoj kaj taŭgaj por klera publiko. Ĉiu propono enhavu mallongan resumon de la prelego kaj koncizan biografieton de la preleganto – sume ne pli ol unu paĝon. Proponoj, kiuj ne estos elektitaj por la IKU, povos tamen esti utiligitaj en aliaj kadroj, kiel Scienca Kafejo. Ĉiu preleganto devas esti kongresano kaj mem zorgi pri sia aliĝo.

Akceptita IKU-prelego estos rekompencita per honorario de 260 EUR. Duono de la honorario dependas de ĝustatempa livero de teksto por la IKU-libro, kaj duono de la efektiva okazigo de la prelego. Pliaj detaloj kaj antaŭaj prelegoj kaj resumoj troviĝas en **la retejo de IKU** <<https://www.uea.org/kongresoj/universitato>>.

## Vintra Esperanta Klerigado

Okazos nova evento je la komenco de la nova jaro: la Vintra Esperantista Klerigado (VEK), kreita de Hanso BECKLIN. Okazigota de USEJ, ĝi celas “klerigi la jam aktivajn junulojn dissemantajn en Usono kaj Kanado pri kiel plej bone skribi, paroli, kaj informi pri, propagandi por, kaj gvidi en la lingvo(n) Esperanto”.



Instruistoj el diversaj partoj de la mondo provizos siajn lertojn kaj gvidos la partoprenantojn pri kiel okazigi programaron por kiuj ajn eventoj. Post VEK, la partoprenintoj okazigos programaron por la venonta UK en Montrealo. La evento okazos en Ĉikago de la 17-a ĝis la 20-a de Januaro 2020, kaj aliĝo kostos \$275. Stipendioj disponeblas per E-USA kaj USEJ. Ĉiuj junuloj estas bonvenaj!

Por aliĝi, bonvolu **plenigi la formularon** <<https://tinyurl.com/VEK-evento>>.

— Lance CLARK

## Alvoko al radioamatoroj

La jara konkurso de ILERA (Internacia Ligo de Esperantistaj Radio-Amatoroj) okazos la 17-an kaj la 18-an de Novembro. Kial ne uzi Esperanton por fari kelkajn kontaktojn kun aliaj Esperanto-parolantaj radioamatoroj? Ĉu mankas al vi radio-aparato? Oni rajtas uzi ankaŭ la programon **Echolink**

<<http://www.echolink.org>>.

En la etero, E-radioamatoroj ofte uzas la frekvencojn 3766, 7066, 14266, 21266, kaj 28766 MHz.

Reguloj troveblas en **Vikipedio**

<[https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia\\_Ligo\\_de\\_Esperantistaj\\_Radio-Amatoroj](https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Ligo_de_Esperantistaj_Radio-Amatoroj)> kaj **la ILERA-diskutgrupo**  
<<https://groups.google.com/forum/#!forum/esperanto-radio-amatoro>>.

Por pli da informo, kontaktu: Murray MERNER, K4MHM ĉe [mmmm0320@gmail.com](mailto:mmmm0320@gmail.com).

— Chuck MAYS

## Forpasis Louis-Christophe ZALESKI-ZAMENHOF

Louis-Christophe (Ludoviko Kristoforo) ZALESKI-ZAMENHOF forpasis la 9-an de Oktobro 2019 en Parizo. Li estis doktoro inĝeniero pri surlanda kaj enmara konstruado, nepo de L. L. ZAMENHOF, filo de Adam kaj Wanda ZAMENHOF, naskita Frenkiel; la personan nomon li ricevis honore al sia avo Ludoviko, la kreinto de Esperanto.



Li edziĝis en 1949 kun Krystyna TYSZKA, kiu naskis du filinojn: Hanna (1953) kaj Margaret (1958). Li havis nepinon Klementina ZAMENHOF-ZARUSKI kaj nepon Pierre-Louis-Antoine LEBARD.

Louis-Christophe loĝis en Parizo kun la edzino Juliette, naskita Sekrecka. Li parolis la francan, anglan kaj Esperanton, sed hejme la polan. Li havis la francan kaj polan civitanecojn, estis honora urbano de Bjalistoko.

Legu pli pri **Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof en Vikipedio**

<[https://eo.wikipedia.org/wiki/Louis-Christophe\\_Zaleski-Zamenhof](https://eo.wikipedia.org/wiki/Louis-Christophe_Zaleski-Zamenhof)>.

## Opero en Esperanto

La 27-an de Septembro, la Nacia Teatro de Prago eksurscenigis la operon *Sternenhoch* kadre de la Internacia Teatra Festivalo en Nitro. Ĝi estas la unua komplete esperantlingva lirika opero.



La libreto, verkita de la ĉeĥa komponisto Ivan ACHER surbaze de la groteska, ekspresionisma romano *Utrpení knížete Sternenhocha* ("La suferoj de la princo Sternenhoch"), publikigita en 1928 de la ĉeĥa poeto kaj filozofo Ladislav KLÍMA, estis rekreita en Esperanto de la ĉeĥa esperantisto Miroslav MALOVEC, kiu ricevis la diplomon de UEA pro Elstara Arta Agado en 2019 sekve de tiu traduko.


La opero restos rete spektebla ĝis la 26-a de Marto, 2020. La tuta enhavo estas spektebla senpage, kun subtitoj en la franca, la germana, kaj la angla, kun ebleco je aŭtomataj subtekstoj en 114 pliaj lingvoj.

**Spektu la operon Sternenhoch en**

**OperaVision** <<https://operavision.eu/en/library/performances/operas/sternenhoch-national-theatre-prague>>.

# Ni kunkongresos en Montrealo kun UEA!

de la prezidanto • Filipino DORCAS



Malgraŭ nia kutimo kongresi ĉiun jaron ie en Usono, ni, la membroj de Esperanto-USA, en 2020 kunkongresos en **Montrealo**, Kanado. Tio okazos de la 1-a ĝis la 8-a de Aŭgusto, 2020, plus eblaj tagoj por ekskursoj.

La Universala Esperanto-Asocio (UEA) okazigos la Universalan Kongreson (UK) en Montrealo. Jen malofta ŝanco partopreni en la UK en Nordameriko! Venu kun ni. Ni kune ĝuos la internacian etoson dum ni faros samtempe nian landan kongreson por Esperanto-USA. Ni uzos kelkajn sesiojn de la UK por niaj propraj aferkunsidoj. Ekzemple, ni faros la finfinajn voĉdonojn por nia estraro kaj anoncos tiujn rezultojn. Ni raportos al la membraro nian staton kaj niajn agadojn per la Jarraporto.

## Venu kun ni!

Bonvolu plani nun partopreni ĉi tiun kongreson kune kun malnovaj kaj novaj amikoj de aliaj landoj.

**Registru vin** <<https://uea.org/kongresoj>>, kaj por pli da informo vizitu **la UK-retejon**

<<https://esperanto2020.ca>>.

Nepre diskutu kaj disvastigu la informon en via loka grupo.

## Helpu la mondon!

La temo de la UK estas la 75-a datreveno de la Unuiĝintaj Nacioj kaj ties 17 celoj por daŭripova evoluigo. Kelkaj celoj temas pri malsato en la mondo, pura akvo, pura aero, la klimato, kaj egaleco.

Tiuj celoj troviĝas ĉe **la retejo de la UN**

<<https://sustainabledevelopment.un.org/post2015/transformingourworld>>.

## Helpu la junulojn partopreni, helpi, kaj gvidi!


Eble vi jam scias, ke la Usona Esperantista Junularo (USEJ) tre aktivas. Ili trejniĝas por esti gvidantoj, kaj uzos ties sperton por plibonigi la aktivan junan etoson ĉe la UK. Vi povas subteni ilin per via bonkora donaco al la **kampanjo “Esperanto in the USA”**

<<https://www.esperanto-usa.org/eusa/support/>>.

Se vi bonkore donos monon al la kampanjo, Esperantic Studies Foundation (ESF) donos la saman kvanton da mono al la kampanjo ĝis \$15,000 entute.

Dankon al ESF, dankon al niaj amikoj kiuj laboras por la UK en Kanado, dankon al la organizantoj de UEA, kaj dankon al vi por veni al la UK kaj por subteni nian kampanjon!

Ek kaj antaŭen!



**Filipo DORCAS**

Filipo estas prezidanto de Esperanto-USA. Li kaj lia edzino Elizabeto loĝas en Fort Worth, Teksaso.

[filipo@grupoj.org](mailto:filipo@grupoj.org)

## De la estraro

### Finiĝis la ripozpaŭzo

---

Charlotte estas Sekretario de E-USA. Oni povas kontakti ŝin ĉe [liquidfireangel@gmail.com](mailto:liquidfireangel@gmail.com).

---

Post tre aktiva somero, mi paŭzis iom por ripozi, sed la laboro iradas antaŭen. USEJ planas novan eventon por klerigi aktivajn junulojn en Usono kaj Kanado. La nova evento – Vintra Esperantista Klerigado (VEK) – okazos en Ĉikago dum Januaro. Oni povas legi pli da informo en la anonco de Lance, USEJ-estrarano.



Mi esperas baldaŭ rekomenci kreadon de miaj jutubaj filmetoj, kaj mi ĉiam pripensas miajn aliajn laborojn.

— Charlotte BURTON

### Treasurer's Update

---

Murray is Treasurer of E-USA. You can contact him at [mmmm0320@gmail.com](mailto:mmmm0320@gmail.com).

---

I am a member of Esperanto-USA. As Treasurer, that should be self-evident. What I mean is that I use the services provided by E-USA as any other member would. Just last week I paid my registration for the 2020 *Universala Kongreso* in Montreal on the E-USA website.



I am a member because I wanted to be a part of something I thought was important and helpful to me. Belonging meant I was not alone in my interests and my concerns, had a ready resource, was in touch with the movement, supported Esperanto in the USA and was connected with other Esperantists. Maybe you have similar reasons.

I was born in Canada and lived in Winnipeg and Toronto. While French is one of the two official

languages of the country, other foreign languages and accents abound. In “the states,” there is not that diversity; although Spanish is becoming prevalent, there is not much need to go beyond English.

As Esperantists in the USA, we see the value of Esperanto in international communication, but we are like lone wolves in the wild. In many cases it is not used in our families or communities. With Esperanto-USA we have a centralized resource to support and connect us and we have an organization to make others aware of the language. It is a resource we can turn to when we have a need. We are not alone.

By joining or renewing your membership you can continue to have Esperanto-USA support your Esperanto aspirations. E-USA has a number of membership options ranging from Introductory to Lifetime. (You can even put E-USA in your will!)

We, on the Board, hope that we meet your personal expectations as we continue our efforts to support Esperanto in the USA. If you have questions or suggestions, let a Board member know.

— Murray MERNER

### Regional Helpers and Robert's Rules of Order

---

Fred is one of the Directors of E-USA. You can contact him at [f3meyer@gmail.com](mailto:f3meyer@gmail.com).

---

This is my first report as a Director of Esperanto-USA. I have primarily worked two issues for Esperanto-USA in the past several months: Organizing the Regional Helpers/Coordinators, and evaluating Robert's Rules of Order for possible application to meetings of the Board of Esperanto-USA and business meetings at the *Landaj Kongresoj*.



I have been trying to facilitate conversations between the Regional Coordinators. Among other things,

Regional Coordinators try to provide information to local groups or clubs. There is no direct relationship between the local groups and Esperanto-USA. We do not grant them a charter or have any other formal relationship. So the primary purpose of Regional Coordinators is to be helpful.

In addition to providing resources to local groups, we also try to find new contact people in our regions and update the list of local groups and contacts on the Esperanto-USA website. So if you have a local group or club and have not been contacted, please find your regional helper and let her/him know about your local organization. Regional helpers will also be looking for you. If you don't have a local group, regional helpers would like to help you form a group or club.

In late August, I found an online meeting time for the Regional Coordinators in early September. Of the ten coordinators, four of us were able to meet. This is a discussion group and we discussed many topics: when did we last contact all the groups in our regions, how to best contact local groups and contacts, what information do we need to get about local groups,

and the shape or composition of the regions. We are planning to meet for discussions on a bimonthly basis.

My second effort as a new Director has been to understand the information available to members of Esperanto-USA. A goal of the leadership is to be very transparent to members. This means that information about Board activities and decisions needs to be available as soon as possible. We are talking about minutes of board meetings, leadership reports, and decisions of the Board present and past. We are making an effort to do better.


One question was what procedure does the board follow in making decisions. One possibility is Robert's Rules of Order. We need rules to be more efficient and avoid controversy. We are a small non-profit board so we do not need to be too formal. Several members of the Board including me are evaluating Robert's Rules of Order. I have proposed a change to the by-laws to adopt a specific version of these rules and to allow the board to make exceptions to these parliamentary rules when needed.

— Fred MEYER, III

---

## ***La vivo de Peĉjo***

Ĥercoj • Timothy BORONCZYK



# Finfine kompleta! (pli-malpli)

de la redaktoro • HOSS FIROOZANIA

**E**stas granda ĝojo anonci ke, post jardeko da intermita laboro, nia retarĥivo finfine enhavas preskaŭ ĉiujn numerojn de ĉiuj bultenoj iam eldonitaj de tutlandaj Esperanto-organizoj en Usono. La enhavo nun inkluzivas ne nur bultenojn de Esperanto-USA/ELNA kaj ties asociaj organizoj por junuloj (USEJ kaj JEN), sed ankaŭ de la aliaj Esperanto-organizoj kiuj antaŭis ĝin (ekz. EANA).



Reklamo por  
Esperanto-  
skribmaŝino, 1908

Mi dankas denove al la homoj kiuj oferis siajn malnovajn paperajn numerojn al la skan-dioj – ofte necesis tranĉe apartigi la foliojn por enskani ilin. Apartajn dankojn meritas Ellen EDDY, Mary HAMMERSMITH, Vilĉjo HARRIS ĉe la Centra Oficejo, kaj Chuck MAYS ĉe ESF. Kelkajn PDF-skanajojn mi trovis ankaŭ rete de la biblioteka skanprojekto de Google, kaj de kelkaj bonkoraj nekonatoj kiuj rete dividis siajn privatajn kolektojn.


La amplekso de la arĥivo nun estas malfacile esprimebla, kaj eĉ iom kapturna. Por doni kelkajn statistikojn, la arĥivo nun enhavas:

- **3.6 gigabajtoj** da datumoj,
- bultenojn de **6 organizoj**: AEA, AEK, EANA, ELNA, JEN, kaj USEJ,
- almenaŭ **11 titolojn**, interalie: *L'America Esperantisto*, *The American Esperanto Journal*, *North American Esperanto Review*, *ELNA Newsletter*, *ELNA Update*, *Esperanto USA*, *JEN bulteno*, *JEN News Digest*, kaj *Ktp!*
- pli ol **113 jarojn** da numeroj (1906 - 2019), kaj
- **991 numerojn** entute.

Do, eĉ se oni vorus po unu numeron tage – paŭzante por ripozi nur semajnfine kaj dum du-semajna

somera ferio – oni povus legi unikajn artikolojn dum preskaŭ kvar jaroj ...

Ne necesas fari ĝuste tion, kompreneble, sed mi kuraĝigas al ĉiuj travadi la arĥivon por malkovri kelkajn el la multaj juveloj kaŝitaj tie. Kun tiom da materialo, estas malfacile elekti ekirpunkton, sed jen kelkaj ebloj:



JEN-bulteno, 1964

- 1906-1908: Naskiĝo de du paralelaj Esperanto-organizoj (AEK kaj AEA), kunfandiĝo al EANA
- 1910 (Oktobro): raporto pri UK en Vaŝingtono kaj vizito de Ludoviko ZAMENHOF
- 1937 (Novembro): raporto pri vojaĝo de Lidia ZAMENHOF tra Usono por instrui Esperanton
- 1950-1957 disputo inter EANA kaj UEA, ekŝiĝo de EANA el UEA, skismo de la movado en Usono, velkado kaj finfina malapero de EANA
- 1953: naskiĝo de ELNA
- 1962: apero de *JEN-bulteno* por junuloj, kiu eldoniĝis ĝis 1972, kaj sporade en 1976, 1985, kaj 1986
- 1993: Apero de *Ktp!* de USEJ, kiu daŭris ĝis 1996, kaj aperis denove en 1999

Se vi emas esplori la arĥivon, pripensu helpi nin trovi la plej interesajn artikolojn por reliefigo en apartaj retpaĝoj – kiel ni faras ekzemple en la ĉi-numera rubriko *el la arĥivo*. Vidu la helpopaĝojn por provlegantoj en la reta kolofono.



## HOSS FIROOZANIA

Hoss estas magistriĝa studento ĉe la Universitato de Rochester (Novjorkio), kie li studas literaturan tradukadon en la anglan ... el Esperanto!

[hoss@lodestone.org](mailto:hoss@lodestone.org)



## Regionaj raportoj

---

Ni petas raportojn de ĉiuj niaj regionaj helpantoj, la homoj kiuj ĝisdatigas nian datumbazon de Esperanto-grupoj kaj kunlaboras kun lokaj grupestroj.

---

### Fondiĝas nova rondo en Hjustono

Post longa tempo en Hjustono (Houston), Teksaso, la 8-an de Oktobro, fondiĝis Esperanto-rondo. Kvin entuziasmaj esperantistoj, kiuj trovis unu la alian per Interreto, unuafoje kolektiĝis kune kaj decidis formi Hjustonan Esperanto-Rondon. Dum preskaŭ duhora renkontiĝo ili babilis, rakontis pri si mem, respondis al demandoj – ekz. kiam kaj kiel ili iĝis esperantistoj – manĝetis, ktp. Fine ili decidis kunveni regule, ĉiumonate, por praktiki sian lingvonivelon, ankaŭ proponante lingvajn temojn por diskuto. Novaj homoj ĉiam estas bonvenaj al la Rondo.

— Alexander MIKISHEV alexmikish@gmx.net

### Sukcesa 27-a NOREK



Partoprenis 19 personoj en la 27-a Nord-Okcidenta Regiona Esperanto-Konferenco (NOREK) la 28-an de Septembro, 2019. Ok programeroj okazis en la kunvenejo *Brentwood Bay Resort and Spa* en Sidney, Brita Kolumbio. NOREK-anoj ĝuis boatan ekskurson dum sunbrila dimanĉo en la fjordo de Saniĉ.

Partoprenintoj: Nick WOODS, Jordon KALILICH, Eric PEDERSEN, Orlando RAOLA, Arlyn KERR, Les KERR, Lottie ERICSON, Paul HOPKINS, Maria HOPKINS, Wally DU TEMPLE, Olga DU TEMPLE, David YAKI, Wayne ILLES, Ben SPEAKMON, Michal SIRUCEK, Richard MENEGOZZO, Evan DU TEMPLE, Simmon Keith BARNEY, kaj Theresa GUINARD. Donacis aliĝkotizon sed ne povis veni Mary HAMMERSMITH kaj Ellen EDDY.

— Wally DUTEMPLE wallydutemple@telus.net

# Renkontiĝo ĉe la Balta Maro

vojaĝe tra la mondo • Orlando E. RAOLA

**P**ro tio, ke mi jam tri jardekojn esperantumas, jam delonge mi estis aŭdinta pri la Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET). Ĝi estas tradicia renkontiĝo, fama pro la muzika kaj kultura enhavo, pro la interesaj prelegserioj kaj pro la amasa partoprenado. Ĝi estas aparte populara por la esperantistoj de la tri baltaj landoj, iamaj sovetaĵaj respublikoj Latvujo, Litovujo kaj Estonujo. Kiam komence de la nuna jarcento mi pli ofte vojaĝis al Eŭropo pro Esperanto, mi ĉiam havis la sopiron veturi al BET. Malgraŭ mia sopiro, ĉiam aperis kialo por ne veturi: kolizio kun aliaj aranĝoj, kiujn mi partoprenos, multekosteco de la tuta vojaĝo, ktp.

Ĉi-jare okazis malsimile. Eble jam komence de la jaro, mi decidis ne plu prokrasti konatiĝon kun tiu elstara ero de la Esperanta kulturo. La fakto, ke la Universala Kongreso, kiun mi intencis partopreni, okazas en najbara Finnlando, decidigis min. Mi serĉis la retejon kaj aliĝis al la 55-a Baltiaj Esperanto-Tagoj, kiuj okazos en Litovujo, lando kiun mi malmulte konis, en urbo Panevezys, kiun mi absolute ne konis. Komencis la kontaktoj kaj interŝanĝoj kun la organizantoj, respond(ec)is rekte Povilas JEGOROVAS, homo kun kiu mi konatiĝis jam antaŭ preskaŭ tridek jaroj. Mi proponis partopreni per prelego kaj li akceptis mian proponon. La prelego fakte fariĝis prelegserio ( kvin prelegoj) pri Mediprotektada Kemio. Mi ankaŭ kontaktis Amri WANDEL, prezidanto de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), kaj tiel mia prelegaro fariĝis ankaŭ kurso aprobita kadre de la Sanmarineca Universitataj Studoj kiuj okazis samtempe kaj samloke kun BET-55.

Mi multe laboris en la preparado de tiuj prelegoj, adaptinte por kvin horoj kurson kiun mi iam instruis en Universitato de Kalifornio ĉe Santa Barbara dum trideko da horoj. Mi ankaŭ preparis mallongan sinprezenton kiu aperis en la retejo de BET kaj en la *Ondo de Esperanto*. Finfine alvenis la somero, kaj post feriado kun mia familio en Hispanujo dum dek



tagoj, mi flugis de Madrido al Rigo kaj per buso atingis Panevezys sekvatage. Jes, temas pri relative malgranda urbo meze de la litova kamparo. Antaŭ tridek jaroj ĝi estis multe pli granda pro la koncentriĝo de elektronika kaj aliaj industrioj, nuntempe multas malplenaj uzinoj kaj la loĝantaro preskaŭ duoniĝis.

Jam de la akcepto mi estis forte impresita pri la organizado kaj pri la kvanto da aktivuloj kiuj laboris en diversaj taskoj kaj helpis pri la enloĝiĝo. Mia gastejo, tute komforta privata ĉambro en studenta domo, troviĝis iom for de la ĉefa renkontiĝejo, en la Teknika Universitato de Kaŭnas, filio Panevezys. Mi iom malfruis por la interkona vespero, do kiam la aranĝo komenciĝis en la mateno de dimanĉo, la 7-a de Julio, min trafis vere unu el la grandaj surprizoj: partoprenis la aranĝon kvarcento da homoj el kvardeko da landoj. Atentu ke ne temas pri kongreso Esperanta, nek pri Esperanta renkontiĝo en alloga turismejo kiu povintus altiri tian amason. Fakte al Panvezys veturis homoj preskaŭ absolute nur pro la intereso en la riĉa kleriga programo. Se iu veturis tien pro turisma allogo, tiun mi ne renkontis. Temas pri rekorda nombro da partoprenantoj. BET-oj estis ĉiam grandaj, sed tiu ĉi estis la plej granda en la historio. Bona sperto por mi, kaj ja entuziasmiga fakto, des pli, ke la partopreno en la posta Universala Kongreso estis bedaŭrinde magra (se ne historia rekordo, sufiĉe proksime, pro la malgrandeco).



En la centra trajna stacidomo de Vilnius, mi vizitis ekspozicion pri libroj. Foto de Marc GIRAUD.

La tagoj flugis fulmrapide. Miaj prelegoj disvolviĝis glate, la prelegejo ĉiam plena je avidaj lernantoj. Mi mem sukcesis partopreni ankaŭ aliajn interesajn prezentaĵojn de Amri WANDEL, Ilona KOUTNY, Walter ZELANY, GaboR MARKUS, Yves NEVELSTEEN. Multajn aliajn mi malgraŭvole maltrafis pro tempa konflikto. Poste, dum la vesperoj, okazis koncertoj kaj kunkantado, kie evidentiĝis, ke multaj el la partoprenantoj konis unu la aliajn de antaŭ multe da jaroj kaj ili kunkantis tiujn kantojn jam de ilia junaĝo – kaj ili kantas ilin ankoraŭ kiam ili estas tute grizharaj aŭ eĉ senharaj. Ekestis magie nostalgia etoso, rekrea ĉiun vesperon, kaj mi absolute ĝojas, ke mi ĝue dividis la sperton kun ili.

Dum merkredo, ekskursita tago, mi veturis kun mia nova franca amiko Marc al la ĉefurbo de Litovujo, la ĉarma Vilnius. Ni ĝuis la viziton, miris pri la belaj apudriveraj parkoj kaj pri la rimarkinda abundo de preĝejoj en Vilnius. Mi ankaŭ notis, ke la elstara pola poeto Adam MICKIEWICZ, kies nomon portas la Universitato de Poznano kie Esperanto kaj Interlingvistiko grave rolas, longe studis kaj verkis en la litova ĉefurbo. Fakte li estas konsiderata ankaŭ nacia poeto en tri malsimilaj hodiaŭaj landoj: Pollando, Litovujo kaj Belorusujo.

Ĉiutage dum la renkontiĝo mi veturis de la universitato al la loĝejo pere de Uber-aŭtomobilo. La ŝoforoj ĉiam estis scivolemaj kaj parolemaj, precipe en la angla lingvo, sed ankaŭ en la rusa. Ili ĉiuj estis aŭdintaj pri Esperanto kaj jam veturigis partoprenantojn de BET. Mi povas aserti, ke plej popularaj estis grupo de pli ol tridek koreoj, verŝajne maloftaj vizitantoj en tiu ĉi regiono.




Diplomitoj en la kurso pri Mediprotektada Kemio dum BET gaje ricevas atestilojn. Foto de Amri WANDEL.

Kiel ĉio cetera, la ravaj tagoj venis al konkludo. Mi finis mian kurson, dek kvin studentoj ekzameniĝis, kaj dek tri sukcesis kaj feliĉmiene ricevis sian atestilon pri la sukceso dum la ferma aranĝo.

Mi adiaŭis multajn novajn amikojn, dankis la organizantojn, pakis la nove akiritajn librojn en modele funkcianta libroservo kaj pluvojaĝis per buso al Estonujo, survoje al la UK en Lahti, Finnlando.

De nun mi fariĝas aktiva varbanto por la Baltiaj Esperanto-Tagoj. Mi rekomendas ilin al ĉiuj tutkore. Veturu al Baltio dumsomere kaj vi havos certe la ŝancon ĝui unu el la plej rimarkindaj manifestiĝoj de la Esperantaj lingvo kaj kulturo.



### **Orlando E. RAOLA**

Orlando estas membro kaj eksprezidanto de Esperanto-USA. Li loĝas en Greenbrae, Kalifornio.

**oraola@gmail.com**

# Sukcesa jubilea NASK

loke • Amanda Higley SCHMIDT



NASK konsistas ne nur el studado. Oni ankaŭ amuziĝas kun plej diversaj ŝerculoj!

Ĉi-jare, kiel kutime, la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto estis bonega. Tamen, eĉ pli bona ol antaŭe. Dum la pasintaj 50 jaroj de NASK, ni neniam havis tiom da homoj: proksimume 100 partoprenantoj, inkluzive de instruistoj, organizantoj kaj gastoj. Estis tiom, ke por la unua fojo necesis du superaj kaj du mezaj klasoj. El la klasĉambroj aŭdeblis ridoj, kantado, ĝoja babilado. Amikiĝis la novuloj kun unu la alia, kaj kun la pli spertaj esperantistoj. Bona etoso jam ekde la komenco regis; homoj interkone ludis, ekkonis nomojn, klopodis uzi Esperanton en konversacioj por la unua fojo.

Pro la 50-jara jubileo, ni havis tre specialan gaston inter ni ĉi-jare: la pranepinon de Ludoviko, Margaret ZALESKI-ZAMENHOF. Ŝi naskiĝis en Pollando, sed pro politika situaciaĉo translokiĝis al Francujo kiel adoleskanto kun sia familio, kaj jam multajn jarojn loĝadas tie, laborante kiel kuracisto. Margaret jam tre bone parolas nian lingvon, danke al la persona gvidado de sia akompananto kaj amikino, Katalin KOVATS, la mondkonata Esperanto-instruisto. Margaret partoprenis la superan nivelon kaj ofte kontribuis al la bona etoso kun sia ofta ridado kaj gaja personeco. Eĉ pli plaĉe, komence de la kursaro vizitis ankaŭ ŝia pli juna fratino, Hannah, kiu loĝas en Pensilvanio. Kune la du fratinoj gvidis diskuton pri homaranismo (en la angla ĉar ĝis nun nur Margaret lernis Esperanton). Estis inspira sperto aŭskulti kaj ekkoni la pranepinojn de Ludoviko, kaj estis vigla aro de demandoj kaj komentoj dum la diskuto.

Diversa gamo da aĝoj ĉeestis ĉi-jare; de bebo kvar-

monata (kies patrino estis en la meza nivelo) kaj la sep-jara filino de Bertilo kaj Birke, al pluraj adoleskantoj kaj gejunuloj, al mezaĝuloj kaj veteranoj plur-jardekaj. Multe da novuloj partoprenis por la unua fojo, tre amikemaj kaj amuzaj. Inter ili estis pluraj kiuj lernis per Duolingo kaj neniam antaŭe uzis la lingvon parolante al vera homo. Ili rapide progresis kaj iĝis entuziasmaj pri la lingvo. Komence de la semajno mi aŭdis paroladon en la angla ofte, sed jam fine de la semajno ne plu. Iliaj cerboj jam ŝaltiĝis en la Esperantan kanalon; dume, ilia plenkoraj ĝuo kaj pasio por la lingvo rimarkeble kreskis. Tiun mirakleton mi tre ĝuis observi.



Margaret ZALESKI-ZAMENHOF (dekstre) kun sia dediĉita instruistino, Katalin KOVATS

La instruistoj elstare bone kreis bonan etoson inter la studantoj, kaj videblis la amikiĝoj. Alena ADLER gvidis tre popularan meznivelan klason en la posttagmezoj, plena je aktiva uzo de la lingvo: kantado, tabloludoj kaj aktivaj ludoj, laŭtlegado de rakontoj, eĉ kunkreado de pupteatraĵo per manfaritaj pupoj. Pozitivaj komentoj abundis de la partoprenantoj pri tiu interesa enkonduko al Esperanto-kulturo. Birke DOCKHORN instruis pli tradician kurson de meznivela Esperanto, kaj mi aŭdis multajn laŭdojn pri ŝia ĝoja humoro kaj afabla helpemo al siaj studantoj, kiuj klare lernis kaj progresis tre facile sub ŝia lerta gvidado. Hans

BECKLIN provizis al la post-bazaj studentoj varian kaj efikan gamon da aktivaĵoj: legado, skribado, paroltaskoj, ludoj kaj kantado kun lia ukulelo, kaj ili rimarkeble progresis. István ERTL ridigis sian supernivelan klason per lertaj vortludoj inter la literaturaj, tradukaj kaj verkaj taskoj. Kaj el sia magia ĉapelo Bertilo WENNERGREN eltiris slipetojn de siaj supernivelaj klasanoj pri tiklaj gramatikaj demandoj. La efiko de tiom famkonata kaj lerta internacia instruistaro estis kleriĝo, amikiĝo kaj ĝuo.

Ankaŭ ĉi-jare la muzikumado estis aparte elstara. Multe da vere altkvalita, mirinda muziko estis prezentita. En la distra vespero sabate, interalie estis la jenaj mirindaĵoj muzikaj:

- Bonega imitbando kantigis nin ĉiujn per la Esperanto-furorkantoj *Ska-Virino* (Esperanto Desperado) kaj *Ĉu Vi Volas Danci?* (Jomo), kaj ankaŭ traduko de *Country Roads* (John DENVER)
- Gary BISAGA, unu el la novuloj, kantis en la stilo de Frank SINATRA (eĉ kun tiustila ĉapelo!)
- Hoss (via redaktoro) tradukis kaj akompanis sur sia memkreita gitaro la faman kanton de Fleetwood Mac, *Landslide*, kantita tre emociplene de Alena.
- Tomaso ALEXANDER kaj lia edzino Dejna kantis dolĉan am-dueton (eĉ kisis, tute ĉarme).
- kaj fine, Majko HAKANTO regalis nin per mirinde bonaj memverkitaj kantoj kiujn li akompanis per pasia pianumado.

Eĉ pli da muziko okazis dimanĉe, kiam Alena, Bertilo, Birke kaj Majko prezentis koncerton de diversaj kantoj tradukitaj de Bertilo. Se vi ne jam scias, Bertilo estas eble eĉ pli fama pri muziko ol pri gramatiko. Li partoprenis kelkajn el la plej famkonataj bandoj de Esperantujo (Amplifiki, Persone k.a.) kaj daŭre impone tradukas kaj prezentas kantojn kun amikoj. Aparte plaĉas al mi liaj elektoj, speciale la tri-voĉharmonia kanto de Crosby, Stills & Nash kiu vere impresis nin ĉiujn.

Nu, tiuj kiuj jam partoprenis NASK-on jam komprenas kiel mirinda estas la kursaro. Se vi neniam mem partoprenis, vi maltrafas ion tre specialan. Nenio kompareblas al tuta semajno en Esperantujo, kie oni vere klopodas progresi en sia lingvo-uzo, per ne nur diligenta studado sed ankaŭ amuzaj ĉiutagaĵoj. Oni ne nur aŭskultas prelegojn aŭ partoprenas diskutojn, sed ankaŭ ŝercas, ludas, dancas, muzikumas, manĝas, kreas kaj babilas “ĝis la nokto nokto-fin’!” Oni ekkonas multajn Esperanto-kulturaĵojn, tre simpatiajn homojn plej diversajn, amason da bonaj tabloludoj en Esperanto (ĉi-jare Kartoj Kontraŭ Esperantujo, 10 Bovinoj, Monopolo, Skrablo ktp, ktp ...) Kompreneble, ĉiuj tre pacience helpas la komencintojn trovi vortojn, kaj ne tro korektas. Ĝi estas sekura loko parolklopodi ĝis vera progreso, sen embarasiĝo, en komunumo de homoj toleremaj kaj komprenemaj. Laŭ mi, simple ne ekzistas pli bona ŝanco esperantumi en Usono.

---

Diris unu el la ĉi-jaraj partoprenantoj:

“When I showed up on Friday and I started meeting people ... and I developed some really deep relationships with them, and I started to really see the culture side of Esperanto, not just the language and linguistics side ... Esperanto just, like, *expanded* in my heart. Even though Esperanto has always been the most interesting language to me, now it means the most to me. And now I'm dedicated to actually learning Esperanto; it's not just some fun thing that I kind of do on the side, I do want to learn Esperanto VERY well. And I want to continue to be part of Esperanto society, Esperantujo, for life.”

— Aaron Cox, recent UW Milwaukee linguistics graduate, 2019 NASK participant

---



### Amanda Higley SCHMIDT

Amanda eklernis Esperanton de Duncan CHARTERS kiam ŝi estis studento ĉe Principia College. Post partopreno en NASK en '96-'98, ŝi multe vojaĝis en Eŭropo per

Pasporta Servo. Nun ŝi estas patrino. Ŝi edukas siajn du filinojn – ambaŭ denaskulojn – kaj regule gvidas Esperanto-kunvenojn. Lastatempe ŝi partoprenas NASK-on kun sia pli aĝa filino, nun 17-jara.

# Traduku!

traduku! • HOSS FIROOZNIĀ, Lee MILLER, Tim WESTOVER

La rubriko *traduku* prezentas al vi diversajn tradukdefiojn. Leginte viajn respondojn, ni faros resumon de la diversaj provoj, kune kun reagoj kaj komentoj.

**T**radukado estas malfacila sed fruktodona ekzerco. Tradukante tekston, vi alfrontos defiojn, esprimojn, kaj vortojn, kiujn vi alie evitus (eĉ senpense). Eĉ se vi ne estas literaturamanto, ni bonvenigas vian partoprenon. Lingvokapablo pliboniĝas nur per streĉo kaj ekzercado.

Ni ne prezentas nin kiel aŭtoritatulojn pri tradukado. Tamen ni estas lingve kompetentaj, kaj ni provos komenti kaj respondi el tia vidpunkto. Tim multe verkis en Esperanto (originale), kaj plurfoje premiĝis en la Belartaj Konkursoj de UEA. Lee estas konata instruisto ĉe NASK, kaj antaŭ kelkaj jaroj redaktis similan rubrikon por la bulteno de la Esperanto-Asocio de Sankta-Luiso. Hoss estas magistriĝa studento pri tradukado el Esperanto en la anglan, kaj liaj tradukoj dufoje premiĝis en la Liro-konkursoj de la eldonejo Sezonoj.

Ni strebos iomgrade sekvi la modelon de la brila tradukisto William AULD, kiu dum jaroj verkis samnoman rubrikon en *La Brita Esperantisto*. (Kompilaĵo de liaj artikoloj nun aperas en **la libro Traduku!** <<https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=7353>>, kaj ni forte rekomendas ĝin al ĉiuj.) Ĉiunumere Auld traktis la diversajn proponojn de siaj legantoj, taksante kaj pripensante la avantaĝojn de ĉiuj, por finfine fari sintezan verkon.

Same kiel li, ni ne asertos, ke niaj sintezaj tekstoj estas perfektaj – neniu traduko povas esti tia. Ni celos nur kunordigi grupon de homoj kiuj kune esploras la arton traduki, malkovros diversajn alirojn al la tasko, kaj progresos en la lerta uzado de Esperanto. Tradukado estas arto, kaj ĉiuj elektas malsimile. Per komparado kaj diskuto ni povas lerni kaj profiti de unu la alia.

La ĉi-numera teksto venas el *A Literary Nightmare* de Mark TWAIN, noveleto kiun Hoss nun tradukas por kompilaĵo de klasikaj usonaj rakontoj kiu aperos ĉe la venontjara UK. La rakonto koncernas diable allogan poemaĉon (oni povus nomi ĝin ankaŭ *ĵinglo* aŭ *orelvermo*) per kiu la ĉefroluloj infektiĝas:

Conductor, when you receive a fare,  
Punch in the presence of the passenjare!  
A blue trip slip for an eight-cent fare,  
A buff trip slip for a six-cent fare,  
A pink trip slip for a three-cent fare,  
Punch in the presence of the passenjare!

*Chorus:*

Punch, brothers! punch with care!  
Punch in the presence of the passenjare!

Efektive, Twain mem ne elpensis la versaĵon; en 1876 ĝi aperis en la ĵurnalo *New York Tribune*, danke al Isaac BROMLEY, Noah BROOKS, W. C. WYCKOFF, kaj Moses W. HANDY, kaj rapide furoris. Ĝia neforgesebleco supozeble inspiris al Twain verki novelon pri ĝi, kaj en postaj jaroj ĝi aperis en diversaj aliaj rakontoj kaj kantoj. En 1998 la biologo Richard DAWKINS citis ĝin en sia libro *Unweaving the Rainbow* kiel bona ekzemplo de “memeo” (angle, *meme*).

Estas multaj eblaj aliroj por esperantigi la versojn. Hoss havas siajn proprajn ideojn, sed li nepre bonvenigas aliajn. Se vi proponos ion spritan, li eble eĉ uzos ĝin en la eldonota traduko, donante al vi rekonon pri via kontribuo.

Eble inspiros vin tradukoj jam faritaj en aliajn lingvojn, ekzemple **la francan** <<https://bit.ly/36LxUA5>>, **la rusan** <<https://bit.ly/2pNUkAk>>, **la italan**, kaj **eĉ Latinon** <<https://bit.ly/32x1rN5>>.

Do, ek al la infektiĝ... nu, la laboro!

La redakcio (trovu la adreson en la kolofono) akceptos vian tradukon **ĝis la 15-a de Januaro**. Bonvolu sendi **nur unu** version, ne plurajn diversajn provojn.

# La murdita skiisto

## enigmo-solvoj

Pasintnumere ni vidis enigmon (*la murdita skiisto*), en kiu oni trovis la du viktimojn, ges-rojn Altej kaj Senviv, mortpafitaj en ĉaledo ĉe montara ski-feriejo.



Antaŭ la ferio, Altej invitis kvar amikojn al naskiĝfesto ĉe sia hejmo. Kiam la gastoj alvenis, li estis for, do ili lasis siajn donacojn kaj foriris. Iam poste okazis la murdoj aliloke, ĉe la ski-feriejo.

Alveninte al la hejmo de Altej kaj ekzameninte la kvar donacojn, prof. Ŝibolet tuj havis bonan ideon pri la kulpulo. Sed kiel?

La unua grava detalo en la rakonto estis, ke oni konis Altejon ĉefe pro lia instruado de akvoskiado kaj subakva esplorado. Due, invitante la kvar amikojn al sia naskiĝfesto, li skribis: “Antaŭ ol mi foriros por skii, venu kaj festu mian naskiĝtagon.” Li tamen diris nenion pri skiado sur *neĝo*.

Dum la pasinta jaro niaj leganto-detektivoj fariĝis tre sagacaj, kaj ĉi-foje ili ĉiuj divenis la solvon. La plej frua respondinto (kiel kutime) estis Rafa NOGUERAS, kiu skribis:

... ĉiuj devus supozi, ke temis pri akvoskiado, ĉar Altej estis fame konata pro tio. Do, la sola homo, kiu ja sciis, ke fakte temis pri neĝskiado (ne akvoskiado), estas tiu, kiu donacis al li paron da ski-

bastonoj: GeorgoNIKOV.

Kontraste, “la tri aliaj, ne sciante kien li planas iri, supozis ke li iros al varma loko!” (Anna BENNETT). Pro tio ili donacis aferojn pli konvenajn al varma loko: libron pri subakva trezorserĉado, harpun-pafilon, kaj sunkaskon.

Do “normale, s-ro Nikov ne sciis, ke la murdito estis interesata pri neĝskiado. Nur la murdinto sciis tion. Do, Nikov probable kulpas.” (Jaidyn LEVESQUE). Aldonis Ellen EDDY, “li certe estus numero unu sur mia listo de murdistoj.” (La redaktoro ne kuraĝis demandi, kial Ellen havas liston de murdistoj.)

La solvo tamen ne tute kontentigis ĉiujn harfendemulojn (interalie la redaktoron). Estas vere strange, ekzemple, ke Altej ne ĉeestis sian propran naskiĝfeston: kial ne? Kaj kvankam Ŝibolet havas kialon suspekti s-ron Nikov, ne estas klare, ke li nepre estas la murdinto. Kiel Roy MCCOY rimarkis:

Ne estas evidente ke Nikov mensogis, ĉar li povus esti sciinta ke Altej iros neĝskii, sed tamen ne kien. Ankaŭ, kiel li estus trovinta la sinkaŝantan paron ĉe la izolita ĉaledo? Mi ne vidas ke Nikov eĉ bezonas bonan advokaton.

Kaj sendube Ŝibolet bezonas multe pli detektivi antaŭ la proceso ...

Gratulon al ĉiuj pro la bonaj solvoj. **En la ĉi-foja lotumado gajnis Jaidyn**, kiu ricevos \$5-rabaton de la retbutiko.

# Pri proponoj ŝanĝi nian lingvon

## el la arĥivo

Ĉi-numere per nia tempoveturilo ni vizitas la jaron 1906 (la plej fruon en nia arĥivo) por pluki artikoleon el la tria numero de *L'amerika Esperantisto*.

Ofte oni renkontas novajn esperantistojn – tre inteligentajn kaj bonintencajn – kiuj volas “plibonigi” la lingvon, kvazaŭ ĝi estus ankoraŭ nova projekto, kaj ne plene vivanta lingvo kun lingvokomunumo, literaturo, kaj longdaŭraj tradicioj.

Tiun emon ŝanĝi la lingvon oni trovas sufiĉe ofte nun, en 2019. Do provu imagi, kiom ofte ĝi troviĝis en 1906 – nur unu jaron post la apero de la *Fundamento*, kiam la infana lingvo estis ĵus rampinta el la lulilo ...

Ĉiu gazeto de Esperanto devas, por averti novajn esperantistojn, montri per grandaj literoj la avizon: “Ne malŝparu tempon por skribi pri dezireblaj ŝanĝoj je la lingvo Esperanto!” Oni kredus ke, se tiuj saĝuloj ĉeestus la kreadon de la mondo, kaj Dio diris al ili ke li havas planon por faligi pluvon el nuboj, ili nepre konstatus per argumentoj tre taŭgaj, ke tio estas

neniel ebla. La fondaĵo de la lingvo jam de longe sin fiksiĝis kaj sin montras en la “Fundamento de Esperanto,” en kiu, laŭ la deklaro de la Boulogne’a Kongreso, neniu havas la rajton fari ŝanĝon. Al tiu oni povas aldoni “nek la rajton, nek la eblon,” ĉar iu klera amiko de lingvo internacia povas vidi ke ni nun

konstruas la trabaĵon de la templo, kaj eĉ se, eble, malgranda malperfektaĵo sin montras, ni ne devas interrompi la fondaĵon por ĝin korekti. Ne; pli bone ol stari antaŭ la laborejo kaj kritiki la laboristojn estas eniri tien, suprenigi la manikojn, kaj helpi al la bona laborado. Oni povas pli frue varbi cent rekrutojn al la vicoj esperantistaj ol fari la ŝanĝon de unu litero en la Fundamento de Esperanto.



## Kolofono

Redaktoro / Editor: Hoss FIROOZANIA

**Kontaktu nin:** <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia  
CMC #271205, University of Rochester  
500 Joseph C. Wilson Blvd.  
Rochester NY 14627-1205  
United States of America

*Usona Esperantisto* estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA. Bonvenaj estas kontribuoj kaj en Esperanto kaj en la angla. Prefere sendu materialojn retpoŝte, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton. Kun aliaj fotoj aldonu notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de la foti(n)toj. Ni resendos poŝte senditajn materialojn se vi aldonas mem-adresitan, afrankitan koverton.

La enhavo de *Usona Esperantisto* estas reuzebla laŭ la permesilo CC BY-SA <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/2.0/deed.en>>. Ni petas, ke oni tamen atentu du monatojn antaŭ ol represi la plej freŝajn artikolojn.

Opinioj esprimitaj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktoro aŭ de Esperanto-USA.

Kontribuontoj eble volus legi la kalendaron de limdatoj kaj redakciajn konvenciojn en nia retpaĝaro.



*Usona Esperantisto* (“American Esperantist”) is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English. Please send materials by email if possible and include your name, address, and photo. With other photos please include the photographer's name along with subject(s), location, and date. We will return mailed contributions if you include a self-addressed, stamped envelope.

The contents of *Usona Esperantisto* may be reused under the Creative Commons Attribution-Share Alike license <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/>>. We ask that you wait two months before reprinting the latest content, however.

Opinions expressed in *Usona Esperantisto* are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.

Contributors may want to consult the submission calendar and style guide on our website.